WIKIPEDIA

Sogda lingvo

La **sogda lingvo** estas inter la iranaj lingvoj de la antikva epoko. Ĝi estis, kiel montras ĝia nomo, lingvo de la lando konita dum antikveco, ekde la jaro 500, eble 1000 antaŭ nia erao, kiel Sogdio, kies ĉefurbo estis *Afrasiab* aŭ *Marakanda*, nuntempe Samarkando. Nun tiu regiono estas plejparte en Uzbekio. La ĝis nun konserviĝintaj skribitaj dokumentoj en la sogda lingvo estis skribitaj en la 8-a jarcento p. K. Tiam Sogdio estis potenca reĝlando, kaj la sogda lingvo estis siaspeca lingvafrankao sur la Silka Vojo.

Poste tiu lingvo malaperis, forpuŝita de la persa kaj la tjurkaj lingvoj. Restintaj parolantoj de multe evoluiĝinta sogda lingvo ankoraŭ vivas en Taĝikio — la lingvo de ili parolata estas konata kiel jagnoba, aŭ nov-sogda.

Eksteraj ligiloj

- plena gramatiko de la sogda lingvo (angle) (http://fas.harvard.edu/~iranian/Sogdian/sogdiancomplete.pdf)

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Sogda_lingvo&oldid=6659291"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 17:24, 30 jun. 2019.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.